



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 247

Novembro, 2006

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto

Stevens Norvell — kompostisto

Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson

329 Poplar Drive

Dartmouth, Nova Scotia

KANADO B2W 4K8

bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:

Reni Porter

71 RidgeValley Road

Halifax, Nova Scotia

KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado estas \$8, por Usono \$12, kaj por aliaj landoj estas \$20

☆☆

TRI LASTATEMPAJ RAPORTOJ

Estis interese noti, ke lastatempe aperis tri pozitivaj anglalingvaj raporto pri Esperanto. Unue aperis „A Visit to Esperantoland” de Arika Okrent, en la revuo *American Scholar* (Vintro 2006, 75(1), p. 93-108). Je la 18-a de julio okazis intervjuo de Humphrey Tonkin dum la radiofona programo “The Sunday Edition”. En septembro aperis en la revuo *The Walrus* „Tongues of the World, Unite!” de Alison Gillmor.

American Scholar (usona erudiciulo) estas longe-establita, erudicia revuo el Washington, D.C. *The Walrus* (la rosmaro), kiu aperas ekde 2003, estas pli nova kanada revuo, kiu celas publikan diskurson pri gravaj sociaj aferoj, kaj naciaj kaj internaciaj. „The Sunday Edition” (la dimanĉa eldono) estas nacie dissendita programo pri naciaj kaj internaciaj aktualaĵoj. Ĉiuj estas respektataj fontoj de novaĵoj kaj opinioj.

La artikolo de Okrent (Vizito al Esperantio) havas 15 paĝojn, kaj estas la plej longa el la tri raporto. La aŭtoro, kiu verkadas libron pri planlingvoj, lernis iom da Esperanto kaj iris al la 2003 ELNA Kongreso, kaj la 2004 Tut-Amerika Kongreso de Esperanto en Havano, Kubo. Ŝi skribas, inter aliaj aferoj, pri Kimo Henriksen kaj esperanta rokmuziko, la historio de la lingvo, la kutimaj publikaj reagoj al Esperanto, kongresaj etosoj, Ivo Lapenna, kaj „Sola,” la kanzono de Amplifiki. Ŝi parolis kun Kimo, Normando Fleury el Montrealo, kaj Humphrey Tonkin. Ŝi skribas el la vidpunkto de iu kiu ĵus eniris Esperantujo de la ekstera mondo, kaj iom-miras, iom-dubas pri tio, kion ŝi tie trovis, sed, je la fino, mi pensas ke ŝi miras pli ol ŝi dubas. La artikolo estas bone verkita, interesa, ne tre serioza – la

aŭtoro priskribas Kimo Henriksen tiel: „way cooler than you’d expect an accordion-playing Esperantist to be” (multe pli ĝismoda ol tio, kion oni atendus de akordiono-ludanta esperantisto”) – kaj, laŭ mi, leginda.

La artikolo (Lingvoj de la mondo, unuiĝu!) en *The Walrus* estas pli mallonga, nur kvar-paĝa. La aŭtoro parolas pri la historio de planlingvoj, kaj pri la historio kaj aktuala uzado de Esperanto. Ŝi intervjuis Wally du Temple kaj Mark Fettes, kaj menciis la Kanadan Esperanto-Asocion. Ŝi faris unu-du malgrandajn erarojn (ŝia defino de „krokodili” ne estas tute korekta), sed la plejmulto de la artikolo estas preciza kaj pozitiva. Ŝia artikolo estas iomete malpli formala, kun lingvo kaj temoj kiuj eble rilatus pli al junuloj.

La intervjuo de Michael Enright kun Humphrey Tonkin estis tre interesa. Dum la intervjuo, Tonkin – profesoro, aŭtoro, tradukisto, klerulo – prezentis bildon de Esperanto kiel seriozan aferon, ne kiel ian kuriozaĵon.

Mi trovis, ke tiuj tri raportoj, kune, prezentis pli-malpli precizan kaj pozitivan bildon de la historio kaj uzado de Esperanto, precipe en Nord-Ameriko. Mi ne scias kial ili ĉiuj venis preskaŭ samtempe – eble raportoj de la unua aŭtoro instigis scivolon en la dua, k.t.p. – sed, kontentigas min vidi kaj aŭdi tiajn raportojn. Por kelkaj homoj, tiuj raportoj prezentos al ili la mondon de Esperanto, ion novan kaj, espereble, interesan. Por aliaj, la raportoj eble prezentos pozitivan bildon de io pri kio ili nur aŭdis negativajn, malĝustajn onidirojn ĝis nun. Eble, por aliaj, tiuj raportoj faros ion alian – eble ili estos ŝlosiloj al nova mondo. Kiel lerneja studento (antaŭ multaj jaroj!), mi aŭdis ie pri Esperanto, kaj la ideo interesis min, sed mi ne trovis pli da informo. Mi neniam pensis, ke mi trovus manieron por lerni ĝin – sed, jarojn poste, dum universitat-studado, mi trovis faldfoliojn pri poŝta kurso de Esperanto. Tiu faldfolio estis por mi ŝlosilo al nova mondo de amikoj, spertoj, muziko, ideoj, libroj kaj plu, kaj mi daŭre estas danka ke mi trovis tiun ŝlosilon. Eble unu el tiuj raportoj estos por iu alia ŝlosilo al la mondo de Esperanto.

— Laurinda Matheson

LETERO AL POLA AMBASADORO PIOTR OGRODZINSKI EN OTAVO

(Traduko el la angla)

Via Ekscelenco,

Mi ege surpriziĝis kaj malkontentiĝis eksciante, ke la Pola Radio Akcia Kompanio intencas silentigi la esperant-lingvan programon de Radio Polonia. En pli kaj pli proksime interligita mondo, mi kredas, ke ĉi tiu plano kontraŭstaras la interesojn, kiujn Radio Polonia servas.

En via retpaĝaro, vi kuraĝigas min eltrovi la “riĉan kulture heredaĵon, turistajn celojn kaj komercajn oportunojn en Pollando”, lando “antaŭe konata kiel unu el la plej vastaj kaj plej multkulturaj landoj de la (eŭropa) kontinento.” Efektive, tion mi kutime (kaj pli efike) jam faris dum la pasintaj kvin jaroj, aŭskultante al la vigla kaj informoplena duon-hora ĉiutaga programo, kiun “Radio Polonia en Esperanto” alŝutadis al la interreta radio. Mi jam lernis tiom multe pri Pollando, ke mi skribis pri mia deziro viziti Pollandon kaj renkonti la amikajn voĉojn de Radio Polonia. Mi mem konas kelkajn homojn, kiuj jam faris tion. Dum la pasinta jaro, mi ricevis KD-n de popol-kantoj de Mazowsze, kaj mia KD de “Sinjoro Tadeo” estas unu el miaj plej ŝatataj.

La aserto atribuita al PR-a prezidento K. Czapanski pri “postkomunistaj influoj en la programo” estas nekomprenebla. Mi neniam aŭdis pli pri indaj polaj kaŭzoj ol mi jam aŭdis en Radio Polonia en Esperanto. Mi demandas al mi, ĉu vi mem povas kompreni kiel multe ĉi tio gravas por nutri pozitivan bildon pri Pollando. Mi kredas, ke Papo Johano Paŭlo la Dua rekonis la gravecon de la donaco al la mondo de Pollando per tio, ke li donis siajn proprajn mesaĝojn en Esperanto je Kristnasko kaj Pasko. D-ro L.L. Zamenhof estis unu el la plej gravaj polaj novenkondukistoj kiuj iam ajn vivis, kaj de la komenco en 1959, la kutimaj dissendoj de Radio Polonia en Esperanto daŭre pliboniĝis. Lastatempe, ĝi ricevis pliajn leterojn de aŭskultantoj ol ĉiuj aliaj fremdlingvaj dissendoj de Radio Polonia kunmetitaj. Mi forte kredas, ke Pola Radio devus konsideri aliajn metodojn por malpliigi kostojn por financi la pliboniĝon de la servoj al Bjelorusio kaj Ukrainio, anstataŭ mortigi tiel sukcesoplenan dissendon. Mi kredas, ke ekzistas esperantaj amikoj ankaŭ en tiuj landoj. La decido ne spegulas bonan komercan sencon.

Laŭ mia kompreno, la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj iom influas ĉi tiun decidon. Mi multe esperas, ke vi kapablas reagi antaŭ la limdato de la 10-a de novembro 2006, kiun PR-a prezidento K. Czapanski devigis al Radio Polonia en Esperanto por prezenti reagojn, kaj ke vi bonvolas subteni tiel valoran ilon en la pola voĉo al la mondo. Mi petas, ke vi transdonu al la popolo kaj registaro de Pollando mian plenan subtenon por ĉi tiu dissendo. Neniuj novaj programoj estis alŝutitaj al la interreto ekde sabato, la 28-a de oktobro. Kiom longe disaudiĝas Radio Polonia en Esperanto, tiom longe mi aŭskultos.

Sincerajn bondezirojn,
Bob Williamson

NOTO: Pluraj homoj de Nov-Skotio kaj trans Kanado, kaj pli multaj ĉirkaŭ la mondo, jam reagis (ofte multe pli bone esprimite) al tiu terura novaĵo, sed dum novembro daŭre ŝajnis, ke oni finfine silentigos la plej bonan en la mondo esperantlingvan programon, disaŭdigitan de la lulilo de Esperanto, Pollando. Jam estas tro malfrue, sed almenaŭ ĉiu esperantisto en la mondo devus rapide sendi leteron al pola ambasadejo por argumenti kontraŭ tiu ago.

MONOLOGO DE AZENO

Bedaŭrinde, mi estas azeno. Ne plaĉas al mi la homoj. Sed vere estas, ke ankaŭ ili ne tre ŝatas min. Ili preferas la ĉevalojn. La ĉevalo estas la Dio por la homoj. La malgranda, malmola azeno ne gravas. Laŭ ilia opinio, la azeno estas malbela, senpretendema besto, kiu devas almozpeti la manĝaĵon, la akvon. Kiam mi iaas pro malsato aŭ dolorigas min la hufoj, la intestoj, mi ricevas nur batadon. La kuracisto neniam vizitis min. Neniu karesas miajn belegajn orelojn, la grizan hararon neniu kombas. Nur laboro. Ĉiam nur laboro.

Mi grimpas volonte sur la montojn, mi tiras pezajn veturilojn, mi kunportas ŝarĝon sur la spino. Kaj kio estas la profito? Nenio.

Niaj najbaroj en la vilaĝo aĉetis alian azenon kiam la antaŭa mortis pro laciĝo. Ĉi tiu afero ne okazos al mi. Kiel dombesto mi devus esti obeema. Sed ne estas rekomendinde fari ĉion senprokraste. Mia stulta, ebria sinjoro batos min, kiel kutime. Batu, ĝis kiam li volos, ĝis kiam lia koro haltos, ĝis kiam lin trafos apopleksio; ne gravas al mi.

Mi malobeas, ĉar mi ne toleras la maljustecon. Mi havas firman karakteron. Ĉu la homoj ne komprenas, ke ankaŭ la bestoj povas pensi?

— D-ro KÖRÖSI Edită
Oradea, Rumanio

MI ESTAS NENIU

I'm nobody! Who are you?
Are you nobody, too?
Then there's a pair of us – don't tell!
They'd banish us, you know.

How dreary to be somebody!
How public, like a frog
To tell your name the livelong day
To an admiring bog!

Mi estas neniu. Kaj kio pri vi?
Ĉu vi neniuas simile al mi?
Do, ni duopas – kaŝiĝu la ver'!
Ni ekziliĝus aliloken sur ter'.

Kiom morne, esti gravularan'!
Kiom publike, pensige pri ran',
Tagon post tago la nomon gurdante
Ripete, senĉese al marĉ' admiranta!

— Emily Dickenson,
usona poeto (1830-86)

el *Completed Poems (Kompletigitaj Poemoj)*,
1924

— tradukis Steĉjo